



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

REDAKCIO
Paris
27 Boulevard Arago 27
PAUL FRUICIER
ĉefredaktoro.



ADMINISTRACIO
Szegárd
Hungarujo (Hongrie)
PAUL DE LENGYEL
direktoro.

Ĉiuj klarigoj pri abono, anoncoj, manuskriptoj k. c. estas sur la lasta paĝo.

LA MALGRANDRUSA POEZIO.

La malgrandrusa poezio estas preskaŭ tute ne konata en Eŭropo, kaj tio ĉi estas domaĝo. La popolaj kantoj de Malgrandrusujo estas similaj al la sovaĝaj floroj de l' stepo, kiujn la vento dissemas kaj la roso fruktigas. Kiu verkis tiujn ĉi kantojn? Neniu, kaj ĉiu; kaj, kiel la floroj de l' stepo, al ĉiu ili apartenas. La scienculoj elĉerpas kantarajn el tie, sed la popolo tion ĉi ne scias, kaj ne prizorgas: ĝi havas siajn proprajn arĥivojn, detruoblajn de nenia kataklismo, sian mirigan memoron, sian imagon senfine fruktodonan. La Malgrandrusoj nenion faras, ne kantante; ilia ĉiutaga laborado, kiel ankaŭ la gravaj okazoj en ilia vivo, estas akompanataj per cirkonstanca kanto. Kiam la falĉilo siblas tra la greno, ili kantas; ili kantas, gvidante sian plugilon; vespere, reirigante la brutojn, ankoraŭ ili kantas.

Ĉiuj malgrandrusaj ceremonioj konservas signojn de la idola kaj barbara epoko. Kiam oni demandas kamparanon pri la signifo de tiu aŭ tiu ĉi ago, li pripensas kaj respondas:

« Mia patro tiel agis, kaj la patro de mia patro, kaj ĉiuj ekzistintoj antaŭe; ili ĉiuj kantadis la samajn kantojn. »

* * *

Padolujo, Volĥinujo, Ukranujo, precipe tiu ĉi lasta, estas la devenejoj de l' popolaj fabloj kaj kantoj, kiuj naskiĝas, ofte aliformiĝas, transflugadante de buŝo en buŝon, kaj neniam perdas ion el sia primitiva esenco. Tiu ĉi eco estas tiel grande tipa, ke ilia traduko estas preskaŭ tute nebla. La malgrandrusa lingvo, eble plej dolĉa el ĉiuj slavaj idiomoj, estas esence lirecama. Pro ĝia trea riĉeco, ĝia influo estas videbla sur iajn faktojn el la rusa aŭ nuntempa pola poezioj. Ukranja stepo naskis specialan grupon de poetoj.

La malgrandrusa poezio posedas koloron rememorigantan pri malproksima orienta genio, miksite kun norda. Tio ĉi troviĝas, ne nur en kantarano, sed ankaŭ en ordinara idiomato de l' Malgrandrusoj. Ofte la popolo, nesciante, pa-

rolas poete, ne klopodante fari poetajn frazojn. Tiuj ĉi frazoj, kelkfoje strange belaj, meme naskiĝas; kaj oni miregas, ilin aŭdante! La homo, elĵetanta kvazaŭperlojn, eĉ ne pensetas, ke li estas elokventa kaj poeto. Tamen, li estas kapabla prijuĝi elokventecon ĉe la aliaj; ofte li diras: « Via parolo estas ĉizita sur ŝtonon », aŭ « forĝita el ŝtalo ». La Malgrandrusoj trovas elokventan eĉ Naturon; ili aldonas al ĝi vivan fortecon; ili kredas ke ĝi sentas kaj komprenas. De tio devenas ilia mistika kaj poeta karaktero, laŭ kiu nenie troviĝas Mal-esteco, sed kiu vidās ĉie la vivon, kaj ĉie sentas ĝian nepenetreblan misteron.

* * *

Ilia fatalismo estas tre profunda. Kiam ili diris: « estas skribite! » t. e. antaŭdecidite de

Sorto, nenia ekzistas argumento, kiu povus al ili pruvi la kontraŭon. Pro tiu fatalismo, indiferece ili rigardas la morton, kaj ofte blinde kuras al plej minacanta danĝero, ĉar ili pensas: « Se estas skribite, ke mi estas tuj mortonta, mi mortos; se ne, el la danĝero mi eliros sana. »

La sulkaro okupas grandan parton el la vivo de l' Malgrandrusoj. Ĝi estas al ili vasta mondo, plena je misteroj; al ĝi kamparano almezuras ĉiujn siajn sentojn kaj pensojn. Li uzas ĝin en komparo poeta aŭ filozofa; eĉ li elektas ĝin anstataŭ konfidenciulo, por siaj ĉagrenoj. Kiam li estas malkvieta, tiam li vagas sur la kamparo, kie li trovas konsolon. Tiam, li staras rekte antaŭ Naturo; li sentas sin ĝian filon, filon de tiu sulkaro, kiu nutras lin, kaj lin instruas labori kaj kredi.

Legamulo.



◆ ◆ Instruado al infanoj. ◆ ◆

Kelkaj vortoj antaŭ la traduko.

En multaj sciencoj, precipe en pedagogio, ekzistas demandoj egale interesaj por specialistoj kaj ankaŭ por ĉia ordinara homo. Preskaŭ ĉiu plenaĝa homo havas proprajn aŭ parencajn infanojn, kiuj bezonas edukon. Kaj pri ilia edukado oni ne povas kaj ne devas esti malzorgema, kvankam ĝi estus komisiita al plej bonaj edukistoj. Multaj homoj, ne estante edukistoj laŭ profesio, preferas eĉ memper-sonne instrui siajn infanojn, almenaŭ — en la unua periodo de edukado. Por eduki aŭ observi edukadon, oni devas iom koni multajn, almenaŭ komunajn fundamentajn demandojn de pedagogio.

Min apogante sur la suprediritaj, mi proponas tie ĉi al la estimataj legantoj de nia gazeto kelkajn eltiraĵojn, tradukitajn de mi el mia rusa libro « *Metodo por instruado de skribolego* », — kaj mi esperas, ke tiuj ĉi eltiraĵoj koncernas ĝuste tiujn demandojn, kiuj estas indiferentaj al neniu.

Entute, mi pensas, ke sciencaj kaj ankaŭ socie-taj demandoj nepre devas esti iom priparolataj en nia gazeto, por plena kaj ĉiufanka disvolvado de nia lingvo. Pri tio ĉi, kompreneble, la redakcio de gazeto neniam povas havi respondecon pri la opinioj, eldiritaj de l' aŭtoro en presita artikolo. Ĉiu homo ja havas rajton opinii pri ĉio, kiel li volas. La redakcio devas nur observi, ke ĉio presata en la gazeto estu bone skribita (stile) kaj ne enhavu ion videble absurdan aŭ malkonvenan.

Traduko.

Nur rakonto (en larĝa signifo de l' vorto) donas tute taŭgan, sanan nutraĵon por la saĝo de l' infano, sed ne abstrakta konsidero kaj seka priskribo, kiuj ĉiam restas sekaj kaj enuigaj, kiam ajn penus aŭtoroj ilin vivigi. Por komenciĝa lerna legado mi elektas preskaŭ sen-

escepte nur fablojn kaj popolajn fabelojn. Fabeloj kaj fabeloj estas la plej simpla formo de literaturo, kiu estas plej laŭforta kaj laŭgusta por popoloj kaj infanoj. Tiuj ĉi malgrandaj, simplaj vortaj produktaĵoj, pro tuta ilia senarteco kaj simpleco, distingigas, preskaŭ ĉiam, per tia profundeco de penso kaj tia majstreco de konstruo, per kiu malofte distingigas eĉ plej bonaj produktaĵoj de plej bonaj profesiaj verkistoj. Tiuj ĉi plej simplaj vortaj produktaĵoj estas tiel kunpremitaj, iliaj personaĵoj tiel vivaj, karakteraj kaj relifaj, iliaj ideoj tiel profundaj kaj fortaj, ke, akceptitaj de leganto, ili restigas en lia saĝo profundan, neelviŝeblan postsignon. Tiuj ĉi produktaĵoj estas tre kapablaj riĉigi la saĝon de la leganto, doni al ĝi puŝon kaj devigi ĝin labori en sciata direkto. Alta indo de tiuj ĉi vortaj produktaĵoj estas elokvente pruvata ankaŭ per tio, ke ili travivis centjarojn, eĉ miljarojn, atingis nin kaj, sendube, ankoraŭ post ni vivos centjarojn kaj miljarojn, ĉiam junaj, ĝustatempaj, plenaj da profunda signifo kaj intereso. Kompreneble, oni povas diri ĉion tion ĉi pri nenia produktaĵo de ies persona kreado.

Ideoj, enhavataj en tiu ĉi vorta materialo, preskaŭ senescepte koncernas regionon de ĉiutagaj homaj interrilatoj, kaj tiu ĉi regiono, sendube, estas la plej grava objekto de l' homa pensado, kien prefere, de la plej juna aĝo, la penso de lernanto devas esti direktota, se ni volas fari lin morale-akrasenta, pensema homo, rilatanta konscie al sia persona kaj ĉirkaŭa vivo. Tiu ĉi vorta materialo pretigas la lernanton por memstara legado de seriozaj, pli-malpli

grandamplaksaj vortaj produktaĵoj, t. e. pretigas lin por eniri en la vastan regionon de l' nacia literaturo, en tiun ĉi riĉan, komunatingeblan trezorujon de penso; unuvorte, ĝi kondukas lin sur tiun vojon, sur kiu irante, li mem, sen ia flanka helpo, povas atingi la plej altajn ŝtupojn de l' spirita disolveco, kiuj nur estas atingeblaj de matura homo.

*

Transiro de enklasa legado al legado eksterklasa estas tre grava, decida momento de l' instruado, de kiu, en signifa mezuro, dependas la rezultato de l' tuta lerneja afero. Se instruisto prosperos kutimigi lernanton al memstara legado, per libroj donataj por tralego, — *lernanto* fariĝos *leganto*, kaj lia plua spirita disvolviĝo estos garantiita por ĉiam; kaj se instruisto ne prosperos fari tion ĉi, la lernanto povas resti por ĉiam tute indiferenta al memstara legado. Patruja literaturo, kun ĉiuj ĝiaj trezoroj estos por li kvazaŭ ne ekzistanta kaj sekve, la ĉefa, plej oportuna vojo de l' spirita disvolviĝo estos fermita al li por ĉiam.

Elektante librojn por lerneja biblioteko, la instruisto tute ne devas sin apogi sur sia propra opinio, sur sia persona impresio, ricevita de tralegita libro, ĉar alie, li riskas enfali en grandajn erarojn. Kio ŝajnos al li belega, tio povas montriĝi al infanoj tute maltaŭga, kaj reciproke. Tial, la infanoj mem devas juĝi pri indo de la libroj, donataj al ili por legado; kaj nur gvidante sin per iliaj atestoj, oni povas kunmeti bibliotekon tute bonan kaj tute taŭgan por infana legado.

El sia verko

« Metodo por instruado de skribolego » tradukis

M. S. Rakitski.



Italaj proverboj.

- | | |
|--|--|
| 1. Neniu naskiĝas majstro. | 7. Mallumo kaj mallumo faras mallumon. |
| 2. La virino ĉe la fenestro, la kato ĉe la supo. | 8. Akvo kaj fajro estas bonaj servistoj, sed malbonaj mastroj. |
| 3. Se la pilolo estus bongusta, ĝi ne estus kovrita per oro. | 9. La malsato estas la plej lerta kuiristo. |
| 4. Post la fakto, ĉiu estas saĝa. | 10. Kiu du leporojn samtempe ĉasas, tiu neniu kaptos. |
| 5. Al kiu Dio ne donis filojn, la diablo donas nevojn. | 11. Kun floroj oni ne iras muelejon. |
| 6. Tiu, kiu ne ludas, gajnas multe. | 12. Pripensu hodiaŭ, kaj parolu morgaŭ. |

Tradukis Clarence Bicknell.
(Bordighera.)



La kormovoj de ruĝa perdrikido.

(Rakontitaj de li mem.)

Vi scias ke la perdrikoj iradas bande kaj kuŝas kune en la kavo de sulkoj, por levi sin je la plej malgranda brueto, disflugantaj kiel manpleno da grajnoj, kiujn oni semas.

Nia bando estas gaja kaj grandnombra; ĝi loĝas sur la ebenaĵo, je la limo de granda arbaro, kun bona nutraĵo kaj belaj rifuĝlokoj sur du flankoj.

Tial, de l' rempo kiam mi eksciis kuri, bone kovriĝinta de plumoj kaj bone nutrata, mi pensis, ke mi estis tre feliĉa vivi.

Io tamen malkvietigis min iom, nome tiu fama malfermiĝo de la ĉasado, pri kiu niaj patrinoj komencis paroli mallaŭte inter si.

Maljunulo el nia bando diris ofte al mi pri tio:

« Ne timu, Ruĝeto, » — oni nomas min Ruĝeto pro miaj sorpkoloraj beko kaj piedoj, — « ne timu, Ruĝeto. Mi prenos vin kun mi en la tago de l' malfermiĝo, kaj mi estas certa, ke nenio malbona okazos al vi. »

Li estas maljuna perdrikviro tre ruza kaj ankoraŭ facilmovi, kvankam li jam havas sur la brusto la signon nomitan « ĉevalhufo » kaj ankaŭ kelkajn plumojn blankajn, tie ĉi kaj tie. Dum lia juneco li ricevis en flugilo kugleton el plumbo, kaj ĉar tio ĉi lin faris iom peza, li dufoje kalkulas antaŭ ol ekflugi, pasigas la necesan tempon, kaj tiras sin el la danĝero. Li ofte kondukis min al la limo de l' arbaro. Tie sidas stranga dometo, meze de la kaŝtanoj, ĉiam fermita, kaj muta kiel dezerta terno.

« Rigardu bone tiun domon, malgrandulo », diris al mi la maljunulo; « kiam vi vidos fumon elirantan el la tegmento; kiam la pordo kaj la kovriloj estos malfermitaj, malbone estos por ni. »

Kaj mi fidis al li, bone sciante ke por li tio ne estos la unua malfermiĝo.

Efektive antaŭ kelkaj tagoj, je la leviĝo de l' suno, mi aŭdas, ke oni vokas mallaŭte el la sulko . . . « Ruĝeto! Ruĝeto . . . »

Ĝi estis mia maljuna perdriko. Li havis mirigajn okulojn. — « Venu rapide », li diris, « kaj faru kiel mi. »

Mi sekvis lin, duondormante, trenante min inter la terpecetoj, ne flugante, preskaŭ ne saltante, kiel muso.

Ni kuris al la arbaro, kaj, preterirante, mi ekvidis ke estas fumo super la kamentubo de la dometo; la fenestrokovriloj estis malfermitaj, kaj antaŭ la pordo staras ĉasistoj tute armitaj, ĉirkaŭigitaj de saltantaj hundoj.

Kiam ni preterpasis, unu el la ĉasistoj kriis: « Ni esploru la ebenaĵon dum la mateno; la arbaron ni esploros post la tagmanĝo. »

Tiam mi komprenis kial mia maljuna kolego kondukis nin unue sub la arbetaron. Mia koro tamen batis kiam mi memoris niajn mizerajn amikojn. — Subite, kiam ni estis tuj atingontaj la arbarlimon, la hundoj komencis kuri al nia flanko . . .

« Platiĝu, platiĝu! » diris al mi la maljunulo, mallevante sin.

Je l' sama momento, proksime de ni, timigita koturno malfermis larĝe siajn flugilojn kaj bekon, kaj ekleviĝis kun tima krio. Mi aŭdis teruran ekbruon kaj ni ĉirkaŭiĝis de strangodora polvo, blanka kaj varma, kvankam la suno apenaŭ leviĝis. Mi ektimis tiel, ke mi ne plu povis kuri.

Feliĉe ni estis atingintaj la arbaron. Mia kolego sin premis post malgranda kverko, mi metis min apud li, kaj ni restis tie kaŝitaj, rigardante tra la folioj.

En la kampoj fariĝis terura pafado. Je ĉiu pafado mi fermis la okulojn, tute skuita; poste, kiam mi fine malfermis ilin, mi vidis la ebenaĵon grandan kaj nudan, la hundojn kurantajn, serĉantajn meze de la herboj, tra la garbaretoj, turniĝante kiel frenezuloj. Post ili la ĉasistoj insultis, vokis; la pafiloj brilis sub la suno. Unufoje, meze de tiu ĉi nuba fumo, mi kredis vidi disjetitajn foliojn, kvankam neniu arbo

estas en la ĉirkaŭaĵo. Sed mia maljuna perdriko diris, ke estas plumoj; efektive, je cent paŝoj antaŭ ni, belega perdrikido griza falis en la sulkon, renversante sian ensangigitan kapon.

Kiam la suno fariĝis tre varma, tre alta, la pafado subite ĉesis. La ĉasistoj revenis al la dometo, kie oni aŭdis grandan ekkrakantan fajron de vinberujaj trunketoj. Ili babiladis inter si, kun la pafilo sur la ŝultro, disputis pri la pafoj, dum iliaj hundoj sekvis malantaŭe, lacegitaj, kun la lango elpendanta . . .

« Ili iras tagmanĝi », diris nia kolego, « ni faru same. »

Kaj ni eniris kampon de poligono, kiu estas apud la arbaro; granda kampo blanka kaj nigra, kun floroj kaj grajnoj, odoranta kiel migdalo.

Belaj fazanoj kun brunora plumaĵo ekpikadis ankaŭ tie, mallevante siajn ruĝajn kronetojn, el timo ke oni vidos ilin. Ha! ili estis malpli fieraj ol ordinare. Manĝante, ili demandis nin pri novaĵoj, kaj ĉu unu el ili jam falis. Dume, la manĝo de l' ĉasistoj, unue silenta, fariĝis pli kaj pli brua; ni aŭdis la glasojn alfrapatajn kaj la korkojn elsaltantajn.

La maljunulo opiniis, ke estas tempo reiri al nia rifuĝloko. En tiu horo, oni povus diri, ke la arbaro dormas. La malgranda lageto, kien kapreoloj venas ordinare por trinki, estis sulkgata de nenia movo de lango. Nenia nazeto de kuniklo en la timianoj de la herbejo. Oni nur sentis misteran tremeton, kvazaŭ ĉia folio, ĉia herbo ŝirmus vivon minacatan. Tiuj ĉasaĵoj arbaraj havas tiom da kaŝejoj: terneŝtojn, la arbajn dikaĵojn, la lignajn faskojn, la arbetaĵojn, kaj ankaŭ la fosojn, tiujn malgrandajn fosojn de arbaro, kiuj konservas la akvon tiel longe post la pluvo.

Mi konfesas, ke al mi tre plaĉus kuŝi en la fundo de unu el tiuj kavetoj; sed mia kolego preferis resti ekstere, por havi larĝan spacon, vidi malproksimen, kaj flari l' aeron

liberan antaŭ li. Bone estis por ni, ĉar la ĉasistoj alvenis en la arbaron.

Ho! tiu unua pafo en l' arbaro! tiu pafo, kiu truigis la foliojn kiel aprila hajlo kaj mar-kigis la bastojn! Mi neniam forgesos ĝin.

Kuniklo elkuris tra la vojo, elŝirante herb-faskojn per siaj ungegoj eltirintaj. Sciuro de-saltis de kaŝtanoj faligante nematurajn kaŝ-tanojn. Ekestis du aŭ tri pezaj ekflugoj de dikaj fazanoj, kaj bruado en la malaltaj branĉoj kaj la sekaj folioj, je l' vento de tiu pafo, kiu ek-

skuis, vekis, timigis ĉion, kio vivis en la arbaro.

Kampmusoj enŝteliĝis en la fundon de siaj truoj. Skarabo elirinte el truo de l' arbo, apud kiu ni kuŝis, ruligis siajn dikajn okulojn ne-intelligentajn, fiksjajn pro la teruro. Kaj libeloj bluaj, burdoj, papilioj, mizeraj bestetoj ektimi-ĝantaj je ĉiuj flankoj. Eĉ malgranda grileto kun purpuraj flugiloj venis sidiĝi ĝuste apud mian bekon; sed mi mem estis tro timigita, por ke mi povu profiti je lia timo.

(Daŭrigota.)

El rakonto de A. Daudet.

Tradukis Sam.



..... KOMPATEMO.

Se vi iros al la monto,
Ne detranĉu konvaletan,
Ĉar flavigus la bukodon
La granda sun' de l' kamparo.

Se vi kaptis en arbaret'
Ian ĝojan najtingalon,
Ne metu ĝin en la kaĝon,
Ĉar tie mortus la birdet'.

Lasu kreski la floraron
Sur la densaj herbaj kampoj;
Lasu kanti la birdaron
Tra la misteraj arbaroj:

Ĉar nur restas al ni larmoj,
Forestante l' amataj;
Kompatinda mi mem homo,
Mi mortetas pro l' ekzilo.

Henri Ramier.

Laŭ versaro de Ŝapōn.



MIKSAĴOJ.

VOJAĜAJ IMPRESOJ.

Kia estas la impreso, kiun ricevas alilandulo alvenanta por la unua fojo Madrid'n, Valencia'n, Granada'n, aŭ Sevilla'n, dum la lastaj tagoj antaŭ Pasko? Kredeble konfuzega! Al la kurioza vidaĵo, kiun montras alitempe urboj kaj vilaĝoj Hispanaj, aldoniĝas tiam ceremonioj vere eksterordinaraj, troveblaj nur en tiu ĉi lando. Malgraŭ mia longa vago tra Hispanujo, Portugalujo, kaj aliaj Sudeŭropaj regionoj, malgraŭ mia malnova kutimo, mi mem estas ankoraŭ kvazaŭmirigata de la movado, bruego, de la miksaĵo de diverskoloraj vestoj, lumigiloj, de kantoj, ridoj kaj funebraĵoj, kiuj nun surdigas, blindigas, kaj ankaŭ... lacigas la ĉeestanton. Nenia

veturilo sur la stratoj, tro plenaj je piedirantoj; ĉi-minute transpasas procesioj, bandoj, societoj, aroj diversaj, homoj surkovritaj per viclaĵaj manteloj kun masko sur la vizaĝo, kaj pinta ĉapego sur la kapo. Kandellegoportistoj, messervantoj, pastroj kantas psalmojn; miloj da procesiirantoj portas kandelojn; la domoj estas iluminitaj, kaj la juvelaroj, multekostaj ŝtonoj aŭ metalajoj, kiuj ornamas la promenigatajn statuojn, resendadas disen multegon da ĉielarke-koloraj fajreroj kaj lumeroj. Ĉio tio ĉi trairas placojn, stratojn, promenejojn inter krioj, ridegoj, dancoj — kurioza kontrasto de l' ploroj ekleziaj al la ĝojo popola...

Antikvajamanto, pli instruita ol ordinara turistoj kiel mi, povus sendube trovi tie multe da antikvaj kutimoj, da signoj de preskaŭ forgesitaj moroj. Unu

el la plej kuriozaj el tiuj ĉi antikvaĵoj, troviĝas ĉe la reĝaj palacanoj en Madrid'. Vi atendas, kredeble, ke mi priskribos la lavon de l' piedoj aŭ mango-servadon al dekdu almozuloj, faritan de l' reĝo: ho ne! tiu kutimo vidiĝas ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Aŭstrujo, kaj aliparte ĝi estas enkondukita en Hispanujon nur dum la dekdua aŭ dektria centjaro. Mi aludas nur kutimon, konservitan el la Hebreaj, t. e. « la pardono al la mortekondamnitaj ». En la « Sankta Vendredo » oni prezentas al la reĝo pladon kun, sure, paperoj ĉirkaŭitaj per nigra banderolo. Ili enhavas la tekston de l' kondamno. La prezentanto demandas:

« Ĉu via Reĝa Moŝto pardonas tiujn ĉi krimulojn? »

« Jes, mi faras, » respondas la reĝo. « Tiel Dio pardonu al mi! »

Antaŭe, kiel pri Jesuo kaj Barabaso, nur unu el la kondamnitaj estis pardonata. La reĝo, nesciante elprenis nur unu paperon el la plado. Tio ĉi estis terura loto, kiun ĉesigis Izabelo II-a, pardoninte al ĉiuj kune, por la unua fojo.

O. Wood.

NURA POR L' ETIKETO.

Dum la vojaĝo en London'on de l' « ŝah » (reĝo) de Persujo, Nasr-ed-Din, la tiama princo de Wales, nune Eduardo VII-a, invitis al ceremonia mangado la Orientan monarkon.

Dum la mangado, oni alportis asparagojn.

Tiu ĉi legomo mirigis la « ŝah »-n kiu kredeble neniam vidinta ĝin, aŭ almenaŭ manginta laŭ la angla maniero: li prenis asparagon, glutis la duonon, kaj... forjetis la restaĵon post sin!!

La gesto estis embarasanta.

Tamen, princo de Wales ne volis, ke lia gasto ŝajnis agi kontraŭ l' etiketo; li jetis mem sur la parĝeton siajn asparagajn restaĵojn — kaj, kia estis la miro de l' servistoj!... ĉiuj aliaj kunmangantoj same agis!!!

A. Sparagido.

EL HINDUJO.

El vojaĝo farita tra Hindujo dum la pasinta jaro, Fraŭlino Delphine Menant povis alporti fotografajojn pri la ceremonio de « *Boj devi* » (t. e. enmeto de

l' parfumoj) kiu estas farata kvin fojojn ĉiutage en la « Parsiaj » sanktejoj, laŭ treege antikvega regularo.

La pastro, ricevinte iajn purigajojn, eniras la Fajrejon (*Ateŝh-Gah*) kie la Sankta Fajro troviĝas sur metala vazo (*ataŝh-danh*). Havante la vizagon kovritan per vualo (*pahdan*) kaj la manojn en gantoj (*dasthans*), li lavas la ŝtonon, sur kiu staras la *ataŝh-danh*, enmetas lignon en la Fajron, elparolas la « *Ataŝh Njagiŝh* », preĝon en la honoro de *Atar*, la Fajro, filo de *Ormuzd*. Poste, eldirante la vortojn « *duŝmata; duzhukta; duzhvarskta* », li trifoje svingas sonorilon por forpeli « la malbonajn pensojn », la « malbonajn parolojn », la « malbonajn farojn ».

En la Sanktejo de l' Fajro, en Surat, estas faritaj la fotografajoj. Kvankam bone akceptite de la pastroj, Fraŭlino Menant, kiel la aliaj « *nezoroastranoj* », ne ricevis permeson transiri la internan limon de l' preĝejo.

Fotografajo de antikva grandvalora manuskripto, kie estas klarigita la dirita ceremonio, montras la situacion de l' pastro turnanta ĉirkaŭ la fajro por la sandallignon enmeti, kaj ankaŭ montras la tekston de la vortoj el « *Avesta* », kiujn li elparolas samtempe.

El « *Academie des Inscriptions et Belles-Lettres* ».

POR LA MUZIKAMANTOJ.

Antaŭ kelkaj jaroj, la glora komponiciisto *Saint-Saens* subite malaperis, nenion antaŭdirinte. Jam ĉiuj liaj amikoj malkvietigis, timis pri la pereco, kiam oni sciigis per telegramo ke li sekrete vojaĝas. Jen estas la faktoj, kiuj rekonatigis lin:

Veturante sur vaporsipo, li sidis posttagmezon en la salono, legante revuon. Ne malproksime de li, junulino vane provis ekdudi muzikaĵon de l' majstro mem. Tiu ĉi lasta estis kompreneble tre incitata de la eraroj de l' fraŭlino. Subite, li starigis, kuras al la fortepiano, forpuŝas la ludinton, kaj brilege daŭrigas la ludadon. Mirego de la fraŭlino; interklariĝoj...; fine tiestanta ĵurnalisto, apenaŭ elŝipiginte, kuris al telegrafejo... Tiel montrigis « *la pinto de l' orelo* » laŭ la diro de La Fontaine en sia fabelo « *Azeno prenis sur sin leonan felon...* » sed en tiu ĉi okazo, pli bone estus skribi ke « *Leono prenis sur sin azenan felon, kiu, tro mallarĝa, baldaŭ elfendiĝis.* »

AGRABLA VIVMANIERO.

Neniam estis en Konstantinopolo tiom da spionistoj oficialaj, kiom estas en la nuna tempo. Multe da loĝantoj petis ja aparteni al la sekreta policistaro, pensante ke tio estas la sola rimedo por trankvile vivadi. Oni povas diri sen trograndigo, ke ekzistas en la urbo dekmil spionoj, kies korespondadojn oni esploras nokte kaj tage en kvin oficejoj, ĉe la imperia palaco. Ĉiutage, kvardeko da specialaj agentoj raportas parole al Sultano. Kompreneble, tiuj ĉi agentoj kiel eble plej bone montras sian fervorecon, por eviti la perdon de l' ofico, t. e. denuncas grandnombron da senkulpuloj. Tia estas la deveno de l' plimulto de l' komplotoj eltrovitaj en Konstantinopolo.

Ĉiuj ministroj, eĉ la Grand-Veziro, estas aparte observataj, same kiel la bankoj, hoteloj, kaj multaj privataj loĝejoj. Ŝajne, kvazaŭ por protekti kontraŭ anarĥiistoj, senĉese agentoj staradas apud ambasadorejoj, delegitejoj, konsulejoj, kaj denuncas, kiel suspektindulojn, la Turkojn tien enirintajn. Turko, kiu zorgas pri sia libereco, ne kuraĝus viziti fremdan reprezentanton, ne ricevinte specialan permeson de Sultano. La otomanaj regatoj eĉ ne maltimas plu interparoli kun siaj alilandaj amikoj en publika loko aŭ strato; la plimulto el ili devis ĉesi ĉian rilaton kun Eŭropanoj. Ili estas devigitaj proponi al Sultano nomaron de siaj amikoj, alilandaj aŭ ne, kaj estas tuj ekzilataj, se ili daŭrigas viziti suspektindulon.

Turko deziranta proponi vespermanĝon aŭ vesperkunvenon, devas komuniki al la polico la nomaron de siaj estontaj gastoj, kaj ilin ricevi nur post

permeso. Cetere, okazas ofte, ke tiuj ĉi kunvenoj estas malpermesataj ĉe la lasta minuto, pro supera ordono. Kiam la invititoj alvenas, ili trovas ĉe l' pordo policiston, kiu petas, ke ili reiru hejmen — kaj neniam kontraŭfaro estas ebla.

La spionoj estas ĉiupovaj; dekduoj da arestoj ĉiutage fariĝas. Antaŭ nelonge, laboristo estis forsendata en Jemen'n, nur ĉar li estis laborinta ĉe la reprezentanto de fremda regno.

El la « Neues Wiener Journal ».



INSTRUITE DE MASCAGNI.

La Itala komponiciisto *Mascagni*, iam starante ĉe hotela fenestro en London', rimarkis gurdiston apude, kiu ludas la konatan « intermezzo » el « Cavalleria Rusticana ». Subite, incitite de la tro malrapida ludado de l' gurdisto, li eliras sur la straton, kaj alparolas la ludanton:

— Lasu al mi la turnilon, ke mi ludu!

— Sed... Kia vi estas, Sinjoro?

— Mi estas l' aŭtoro de l' muzikajo. Vi nebone ludas, kaj mi volas montri al vi la ritmon.

Kaj li komencis ludi laŭ la tempa proporcio.

La sekvantan tagon, li vidis denove ĉe la sama loko la saman gurdiston. Sed tiu ĉi, antaŭ ol ekludi, elpendigis grandan skribajon, kun la vortoj:

« Instruito de Mascagni ».

Oni divenas la mienon de l' komponiciisto...



Kvar jartempoj.

(Poemo en prozo.)

Mi songis. — Estis mirinda printempa mateno, rozkolora, freŝa, juna; la suno estis leviganta super la horizonto; printempa juna foliaro sur l' arboj, ŝajnis rideti renkonte al la naskiĝanta tago. Larĝa, senfina malproksimaĵo estis etendiĝanta antaŭ mi. Mi paŝis post la

sojlon kaj apenaŭ faris kelke da paŝoj, kiam apud mi aperis malgranda knabineto. Flor krono ornamis ŝian buklan kapeton.

— Ni iru, ludu kune! — ŝi diris al mi, kaj mi ĵetiĝis post ŝi... En mia animo estis facile kaj gaje, — mi nenion sen-

tis, krom la deziro, kuri sur la verda, larĝa kampo . . .

Estis mateno. Estis la mateno de l' jaro — *printempo* . . . La mateno de l' vivo — infaneco.

* * *

La suno estis leviĝanta ĉiam pli alten; ĉiam pli varmege ĝi kisis la teron trankviliĝintan. Mia amikino ŝanĝiĝis, — antaŭ mi staris bela knabino kronita per krono el maturaj spikoj. Ŝi enpense rigardis la malproksimajon, kie, inter oretaj kampoj sur herbejeto, junaj knabiĵoj kaj junuloj gaje dancis kaj kantis. Ho! kiel mi ekdeziris en tiu minuto ĵeti min en ilian gajan dancan rondon! Mi ree ekrigardis mian akompanantinon. L' okuloj ŝiaj kvazaŭ brulis, la lipoj ridetis:

— Iru ni al ili, — diris ŝi, — ni kantu, dancu, ni amu!

Kaj ŝi fortiris min en la gajan dancrondon. Kaj la suno estis leviĝanta ĉiam pli alten.

Estis tagmezo . . . La tagmezo de l' jaro — *somero* . . . La tagmezo de l' vivo — juneco!

* * *

Turniĝante en la gaja dancado, mi ne rimarkis, ke la suno estis malleviĝanta al la subiro, ĝiaj ankoraŭ varmaj radioj lumis mole. Mi ne scias, kial mi malrapide, kun bedaŭro, sed obeante ian nekompreneblan forton, forlasis la bruantan dancrondon. Mi ririgardis ĉirkaŭen. La folioj flaviĝis . . . plensukaj fruktoj pro sia ŝarĝeco fleksis al la tero la branĉojn de l' arboj . . . Renkonte min iris mia akompanantino. Ŝi estis virino alta, forta; ŝiaj oku-

loj rigardis trankvile kaj kviete de sub vinbera krono, ornamenta ŝian severan frunton. Du ĉarmegaj infanoj kun gaja rido sekvis ŝin.

— Ni laboru kune! — diris ŝi, metante korbon, kiun ŝi portis sub l' arbon.

Mi aliris al ŝi, kaj ni komencis la kolek-tadon de l' fruktoj. Ni laboris amike, kun agrablo aŭskultante la ridon de l' infanoj. Kaj la suno estis malleviĝanta ĉiam pli kaj pli malalten . . .

Estis vespero . . . La vespero de l' jaro — *aŭtuno* . . . La vespero de l' vivo — maturaĝo.

* * *

Laborante, mi komencis senti, ke mi laciĝas. Mi rektigis la lacan dorson kaj ĉirkaŭrigardis . . . La suno subiris . . . mola, lanuga neĝo kovris la tutan ĉirkaŭaĵon. L' arboj en arĝenta prujno enpense klinis siajn fantaziajn blankajn branĉojn. Antaŭ mi en la neĝaj amasoj staris dometo . . . fajreto lumetis tra la frostiĝinta fenestro . . . Sur la sojlo staris maljunulino. Ŝi logis min kaj diris mallaŭte:

— Eniru, ni ripozos kune! . . .

Mi eniris, sidiĝis sur seĝegon apud kameno kaj silente ekrigardis la fenestron: tie malproksime, en brilo de la luno vidiĝis preĝejo, kaj ĉirkaŭ ĝi — la tombaj krucoj, duonsuperŝutitaj de neĝo.

— Tie, — diris la maljunulino, montrante la tombejon, — tie estas l' oriento, de tie atendu novan tagon, brilantan, senfinan, kaj nun estas nokto!

Jes, estis la nokto . . . la nokto de l' jaro — *vintro* . . . la nokto de l' vivo — maljuneco.

El rusa tradukis T. Ŝĉavinskij.



El rememoroj de S-rino V. P. Duĥovskoj. *)

Ĉiun dimanĉon mi venas ĉe la meson en la ĉefpreĝejon kaj klopodas preni lokon kiel eble nerimarkeblan, post kolono; mi tute ne povas preĝi, kiam sur min oni rigardas. En la preĝejo estas tre bonsona sonorilo, por kiu estas pagitaj 4500 rubloj. Ĉefpastro Aleksandro diservas en la preĝejo tre solene, sed, en la ordinara vivo li estas trea gajulo kaj babilulo. La diakono estas persono tute romaninda. Li estas naskita en Ameriko de blanka patro kaj nigra patrino; en la juneco li estis midŝipmano **) sur Amerika ŝipo kaj dufoje suferis de ŝippereo. Post la unua pereco de la ŝipo li ekaperis en Vladivostokon. Dum nebela tago li sidis en ĉifonvesto sur havenbordo, pripensante sian malagrablan sorton; lia malfeliĉa eksteraĵo turnis atenton de preterpasanta komercisto amerikana, kiu sciiĝinte, ke la midŝipmano povas kuiri, dungis lin kiel kuiriston.

Sed la lupo celas ĉiam l' arbaron kaj la maristo la maron, tial li revenis de sia komercisto ree Amerikon. La dua ŝippereo estis ankoraŭ pli fantazia: li sidadis kun du kolegoj ok tagojn sur glaciero, sen ia nutraĵo. La malsato devigis tiujn ĉi malfeliĉulojn manĝi la botojn; sed ĉi-tio estis nesufiĉa kaj ili decidis, ke unu el ili devas oferi sian propran personon kiel manĝaĵon. Loto elfalis sur la estontan diakonon, al kiu estis proponite sin pafi. Apenaŭ li sin pretigis faligi la ĉanon, subite li vidas, ke io granda surrampas sur la glacieron; ĝi montriĝis rosmaro, kiun tuj ili mortigis kaj nutriĝadis per ĝia viando, ĝis ili estis savitaj de preternaĝanta ŝipo. La midŝipmano por danki pro la mirinda saviĝo ekjuris dedoni sin al religia servo. La sorto duan fojon ekfaligis lin en Vladivostokon, kie do li plenumis sian promeson. ***)

Tradukis S. Poljanskij.

*) S-rino D., vidvino de la rusa generalo S. M. Duĥovskoj, eksgeneral-guberniestro Amurlanda, poste Turkeстана, fine membro de la regna konsilio. Ŝi eldonis sian aŭtobiografion, el kiu ni prenas malgrandan peceton el la vivo en Ĥabarovsk sur Amur. La rakonto koncernas la jaro 1894.

***) Un enseigne de vaisseau, der Schiffsfährnich, a midshipman, miĉman (mara subleŭtenanto).

***) En la nuna tempo li estas pastro en unu vilaĝo sur Amur. (Rim. de l' traduk.)



EN BABILONO.

(Psalmo CXXXVII.)

Ni sidadis en suferoj
Ĉe la bordoj de l' riveroj
De la lando de malbon',
En la urbo Babilon'.
Ni doloris,
Ve' nin boris,
Ni l' okulojn tut-elploris,
Ve! ni perdis, ve! ni perdis, ve! ni perdis vin, Sion!'



Sur la branĉojn de salikoj
En la land' de malamikoj,
Pli pikemaj ol skorpi',
Niajn harpojn metis ni.
Harpoj, pendu,
Laŭte plendu,
Kaj de l' tero supren sendu
Niajn larmojn, niajn ĝemojn tien, al Jehovo-Di'.

Al ni venis la premantoj
 Kun postul' de gajaj kantoj :
 « Ludu, filoj de Sion' ! »
 — En la lando de malbon' ?
 Tiom sole
 Ni laŭvole
 Ludos gaje kaj konsole
 Se Sionon ni forgesos por la fremda Babilon'.

Ho, Sion', Jehov-amato !
 Mia lang' al la palato
 Por eterne gluu sin,
 Se mi nur forgesos vin ;
 Se, Siono,
 Mia krono,
 Mia sola kara bono
 Ĉesos esti mia ĝojo, mia celo, mia klin'.

Kaj se tio estos, tiam
 Plen-forgesu sin por ĉiam,
 Ho, amat-Jeruzalem',
 Mia dekstra mano mem.
 Ke la blovo
 De Jehovo
 Per la plej potenca povo
 Min traigu por eterna kordolor' kaj korotrem'.

Amiko.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

« Iru kaj predikadu ! »

Karaj legantoj ! En hodiaŭa mia artikoleto mi deziras montri al vi la rezultaton en propagando de nia lingvo, kiun atingis homo varmege aldonita al nia ideo kaj oferanta je utilo de Esperanto tutan sian libertempon.

En fino de l' jaro 1900 min vizitis Esta Esperantisto S-ro F. A. (nun membro de nia societo « Espero »), kiu petis ke mi sendu al lia konato S-ro I. T., loĝanta en urbo N., lernolibrojn de nia lingvo. Mi volonte plenumis lian peton, ĉar mi de tuta koro ĝojas, kiam al mi prosperos aliĝi iun al nia lingvo. Post elsendo de lernolibroj pasis unua monato, dua . . . mi ricevis de S-ro I. T. nenian komunikon, kaj mi jam pensis ke la supredirita Sinjoro agis kun la senditaj de mi lernolibroj tiel same, kiel la plej granda parto de aliaj, t. e. tra leginte ilin, tute forgesis ne nur pri lernolibroj, sed domage eĉ pri ekzistado de Esperanto.

Pensante tiel, mi eraris ; jen estas la letero, kiun mi ricevis de li post du da monatoj :

« Estimata Sinjoro !

Pardonu min, ke mi respondis al vi tiel malfrue. Mi ricevis senditajn de vi lernolibrojn de lingvo Esperanto kaj dankas vin pro la baldaŭa plenumo de mia deziro. Kun la respondo mi malrapidis tial, ke *mi volis antaŭe tiom el-lerni la lingvon internacian, ĝis mi povus respondi al vi per tiu ĉi lingvo k. t. p.*»

Ĉu multaj personoj, aparte en Rusujo, al kiuj ni sendas la lernolibrojn, respondas tiel ? Ne ! tion ĉi povas konstati la aŭtoro de nia lingvo kaj aliaj Esperantistoj pli-malpli subtenantaj nian aferon.

Vidinte, ke S-ro I. T. povas fariĝi bona kaj sincera amiko de nia lingvo, mi komencis sciigi lin pri la historio de Esperanto kaj aliaj detaloj de l' propagando.

Baldaŭ li sciigis min pri aliĝo de kelkaj siaj amikoj, kun kies helpo li sukcesis fondi malgrandan rondeton da lernantoj, kiuj ofte kunvenas en lia loĝejo por ekzercado je el-lernado de Esperanto.

Iom post iom la rondeto de Esperantistoj en la urbo N. pligrandiĝis kaj en la tempo de mia vizito tiun ĉi urbon (en mezo de majo de l' jaro 1901-a), mi trovis tie ĉirkaŭ tridekon da esperantistoj, el kiuj multaj pli-malpli paroladis jam Esperante. *)

La 2-an de januaro de tiu ĉi jaro mi ricevis de S-ro I. T., membro de nia societo «Espero», detalan raporton pri la tuta laboro kaj progresado en urbo N., je nia lingvo kaj mi kalkulas ne superflue elĉerpi ion el ĝi. S-ro I. T. komunikas: «Nun en nia urbo jam ekzistas pli ol cent Esperantistoj kaj mi devas konfesi ke la plej granda parto el ili estas veraj adeptoj de nia lingvo kaj ne vane portas la nomon de Esperantisto. La sekvantaj lernolibroj de nia lingvo estas disdonitaj kaj venditaj en la daŭro de l' dua duono de jaro 1901:

N-ro 64, 72 kaj 90 po 62 da ekz.; n-ro 85 dudek da ekz.; n-ro 125 naŭdek da ekz. kaj n-ro 145 pli ol cent ekz.; krom tio kelkaj esperantistoj abonas la ĵurnalon L. I.»

Finante tiun ĉi artikoleon mi esperas kaj kredas, ke se laŭ ekzemplo de S-ro I. T. kaj aliaj niaj veraj amikoj, ankaŭ agos la plej granda parto el niaj novaj kaj malnovaj Esperantistoj; tial la progresado de nia lingvo iros antaŭen per grandegaj paŝoj, kaj tiam la homaro estos multe dankema ne nur al la aŭtoro de nia lingvo, sed ankaŭ al tiuj malgrandaj laboristoj kiuj, klarigante la grandegan utilon de lingvo internacia kaj propagandante Esperanton, donis al li fortegan ilon por la atingo de tutmonda paco kaj frateco de popoloj.

V. Kurmanajev.

S.-Peterburg, Kriukov kan. 27.

*) Noteton pri mia vizito en Narvo, vidu en n-ro 7 de L. I., jaro 1901, paĝo 80.

Rimarko de l' aŭtoro.

AVIZO grava. Krom la vojaĝantoj, precipe al la scienculoj kaj komercistoj utilos internacia lingvo.

Rilate al la du lastaj kategorioj, ni ekuzos novan propagandilon.

Senpage ni publikigos, ĝis kiam ni povos, la nomon, profesion kaj adreson de ĉiu ajn komercisto, akceptanta uzadon de Esperanto, kiu petos nin pri tio per poŝtkarto Esperante skribita.

Samtempe, ni petas ĉiujn niajn amikojn, ke ili presigu kaj dispublikigu tiun ĉi avizon kaj tiujn adresarojn ĉien, kien ili povas.

Tio ĉi, unue, pruvos la praktikecon de Esperanto; due, altiros al nia afero multajn komercistojn pro la senpaga reklamo.

Same ni agos rilate al la gazetoj, kiuj akceptas artikolojn en Esperanto.

Ni esperas, ke ĉiuj amikoj de Esperanto helpos al ni por tiu ĉi utiliga entrepreno, kaj povos per tia profito aligi al ni multajn komercistojn.

Oni volu sin turni al la redaktoro de la gazeto: Paul Fruictier, 27, Boulevard Arago, Paris.

«LINGVO INTERNACIA.»

PROPAGANDO.

Ni aparte atentigas niajn legantojn pri la sekvantaj aferoj.

I.

Unu el la rimedoj plej efikaj por la propagando estas la monro al varbontoj de fremda Esperantisto vojaĝanta en alilingva lando kaj facile interparolanta kun tieaj loĝantoj nur per Esperanto.

Pruvo estas la vojaĝo de S-ro *D-ro Krikortz*, dank' al kiu granda movado por Esperanto fariĝis en la Dijona kaj Pariza regionoj.

Ni do tre petas la Esperantistojn, kiuj vojaĝos eksterlanden dum la 1902-a somero, ke ili klopodu iri ĝis la franca urbo « Grenoble » (Isère).

Tie eminenta filozofo S-ro *Boirac*, rektoro de la Grenoblea Universitato fervore subtenas nian aferon. Li organizis libertempajn kursojn ĉe la Universitato por nefrancaj studentoj pri leĝoscienco, medicino, artoj, geografio, historio, zoologio, botaniko, mineralogio, literaturoj kaj lingvoj franca, angla, germana, itala, hispana, rumana kaj aliaj. Li ankaŭ interkonsentis kun germanaj Universitatoj

tiamaniere ke la Grenoblea lernotempo estu kalkulata kun la germana.

Kvarcent fremdaj studentoj venis Grenoble-on de ĉiuj landoj en la mondo dum la somero 1901-a (de l' 1-a de julio ĝis la 31-a de oktobro). Jam kvincent petis por l' enskribo dum la 1902-a somero.

Tio ĉi estas do bonega okazo por propagandi Esperanton inter tia internacia publiko. Granda sukceso estus certa, se tie sin trovus nefranca Esperantisto.

La vojaĝo samtempe estas unu el la plej belaj, kiun oni povas fari tra Francujo, pro la belegaj ĉirkaŭaj Alpoj, konataj en tuta mondo.

Tiamaniere estus tre facile al niaj adeptoj kunligi « *utile dulci* » kaj treege helpi al la disvastigo de Esperanto kaj al eminenta partiano.

Por ĉiuj klarigoj pli detalaj oni povas sin turni al la redaktoro de L. I., aŭ al S-ro *Boirac*, *recteur de l' Université, Grenoble (Isère). France.*

II.

S-ro *Karel Pelant*, prezidanto de la Unua Societo de Aŭstraj Esperantistoj en Brno, skribis al ni:

« Nia societo kvankam konsistanta el laboristoj kaj sekve tre malriĉa, povis tamen bone propagandi per kelkaj rimedoj pri kiuj mi skribos poste al vi, se tio ĉi interesas vin. Unu el tiuj ĉi rimedoj estas l' aranĝo de

amuzadoj, kiujn ni faras por ricevi monon de la publiko. — Jen ni faras ilin kun parolado, jen solajn. Ni gluigas sur la urbajn murojn grandajn afiŝojn kun esperantaj vortoj. La lasta havis per duonmetraj literoj la vortojn: « Granda internacia kostuma amuzado! » Tio ĉi « revoluciigis » tutan Brnon: oni parolis ĉie pri Esperan-

tistoj. Dum la amuzado, niaj membroj interparolis *laŭtege* en Esperanto kaj tre surprizigis la ĉeestantojn. Oni kantis Esperantajn kantojn, kaj forlasis paperan aerostaton kun surskribaĵo «*Esperanto*» kaj l' adreso de nia klubo . . .»

« . . . En alia festo, ni aranĝis pentraĵojn vivajn kaj kantis nian himnon. La entuziasmo

peras, ke vi volas konsili al viaj legantoj, kiuj uzas ilustritajn poŝtkartojn, aĉeti la nian. Tio tre helpas al ni kaj ankaŭ diskonigos la nomon de Esperanto.

100 ekz. ni vendas 5 frankojn, kaj 50 ekz. 3 frankojn. La teksto estos presita senpage en ĉiu ajn lingvo. Oni volu nur ĝin skribi legeble por la kompostisto. La sendo estos



Kunfratiĝo de la nacioj.

estis grandega! Oni fotografis unu el tiuj pentraĵoj kaj ni eldonis ilustritan propagandan poŝtkarton, kies vendo, ni esperu, alportos al ni iom da mono por daŭrigi nian propagandon . . . Ĉar kion fari sen mono? Mi tre es-

afrankita.» — (La vidaĵon oni vidas en la mezo de tiu ĉi teksto.)

Sin turni al S-ro *Jan Kajš*, sekretario de la Unua Societo de Aŭstraj Esperantistoj, — Jusova ul. 8, en *Brno*, Moravujo-Aŭstrujo.

III.

LETERMODELARO KOMERCA.

Al la legantoj de «*Lingvo Internacia*».

En sveda komercinstrua gazeto «*Korrespondens*», kiu havas pli ol 5000 abonantojn, mi de kelkaj monatoj redaktas esperantan parton, enhavantan komercajn leterojn en Esperanto

kun sveda laŭvorta traduko kaj gramatikaj klarigoj, kaj ankaŭ artikolojn pri nia afero.

Por tre granda parto de la legantaro de tiu gazeto monata tiuj ĉi ne tro maloftaj leteroj

estas, tamen, nesufiĉaj, kaj oni ripete demandis al mi plenan kolekton da komercaj esperanto-svedaj letermodeloj.

Tian kolekton mi ja povus ĉerpi el la jam ekzistantaj specialverkoj, sed ili estas skribitaj pli-malpli en sama ĵargono. Ĉiu aŭtoro metis sur sia verko sian individuan stampon, kaj mi, esperantigante la modelaron, certe ankaŭ donus al ĝi iom da mia lingva fizionomio. La verko povus fariĝi taŭga, sed vere internacia ĝi neniel estus.

Komerca letermodelaro, vere internacia estas, laŭ mia opinio, ekzistigebla nur kaj sole per kunlaborado de kiel eble plej multaj diversnaciaj. Celante krei tian letermodelaron, mi adresas min al la estimataj legantoj de nia gazeto kun humila peto, ke oni volu al mi sendi unu aŭ du (se kelkajn, des pli bone!) ne tro longajn leterojn en Esperanto, traktantajn ian

komercan aŭ industrian temon kun aparta atento al ĝia speciala terminologio. Kiam mi estos kolektinta nombron da leteroj, reprezentantan 15 naciojn almenaŭ, mi presigos la verkon, kredeble kajere, kaj provizos ĝin kun paralela sveda traduko kaj necesaj klarigoj. La titolo, nomo kaj nacio de ĉiu aŭtoro estos presita sub ĉies leteroj. Al ĉiu aŭtoro mi sendos unu aŭ du ekzemplerojn de la verko, laŭ la nombro de liaj leteroj, kaj ĉiu ajn el ili havos rajton represigi la verkon anstataŭiginte la svedan tekston per tiu de sia patrolingvo, sen risko al lega persekutado de la flanko de la eldonintoj.

Per tia maniero ni tre facile povus krei komercan letermodelaron kun vere internacia karaktero ekstreme instruiga por ĉiu, kaj kiu, krom tio, posedus propagandan indon, neniel bagatelan.

Stockholm, en aprilo 1902.

P. Ahlberg

sekretario de la klubo esperantista
Stockholm.



KRONIKO.

El Rusujo.

— **S-ro Seleznojv** skribas al ni: « La klopodoj por fondi en Moskvo filion de *Espero* ne sukcesis. La estraro rifuzis la permeson, malgraŭ ke, en la regularo de *Espero* estas regulo, dank' al kiu tiu ĉi societo povas fondi filiojn.

En Tomsk (Sibirujo), mi organizis grandan grupon de Esperantistoj. Ni petis *Esperon* pri permeso (L. I. 1902, N-ro 1-a) malfermi filion. *Espero* permesis, sed ĉu same agos la Tomska estraro? Tio ĉi ankaŭ estas dubebla. »

Oni volu legi pli sube l' alvokon de S-ro S.

*

— **S-ro A. Zinovjev** faris publikan paroladon pri « *Lingvo internacia kaj la modela sistemo de D-ro Zamenhof* », pretekstitan je la cirkulero de S-ro Leau (Lo), en la ĉambrego de la *Poltava publika biblioteko*. Pli ol cent personoj ĉeestis. Post la eldiro, la parolinto estis ĉirkaŭata de multaj demandantoj pri libroj Esperantaj, kaj pri la eblo fondi Rondeton Esperantistan kaj kurson en Poltavo.

— **S-ro Studenov** skribis al ni: « Ĉar S-ro Winnickij sciigis per L. I. (1-a, 1902), ke li transsendis tutan abonmonon por « Beletristo » al S-ro de Lengyel, kiel abonpagon por L. I. dum 1902-a jaro, kaj ĉar mi jam pagis la lastan abonon aparte kaj pli frue, mi tial deziras oferi miajn du rublojn por la fondo de *humorajista gazeto Esperanta*. »

El Bohemujo — Moravujo.

— **Kurso pri Esperanto en Brno**. La Unua Societo de Aŭstraj Esperantistoj presigis grandajn verdajn afiŝojn dulingvajn por anonci kurson pri Esperanto. Ekzempleron ni ricevis. La afiŝo estas 94 × 63 centimetra. La vorto « Esperanto » estas presita per literoj je 8 × 14 centimetroj. La teksto anoncas en la lingvoj bohema kaj germana, ke nova kurso estos komencata la 12-an de Marto en la sidejo de l' Societo (Jusova ul. N-ro 8). Enskribopago estas 50 heleroj, kaj monata pago 20 heleroj. Geinstruontoj: Fraŭlino *Kramoliš* por la ger-

mana lingvo, kaj S-ro *Pelant*, prezidanto de l' Societo, por la bohema lingvo.

Tio ĉi estas certe tre bona propagandrimedo por diskonigi la nomon de Esperanto, kiun tiel multe da personoj legos devigite.

*

— **La gazetistaro.** S-ro *Čejka* havis l' afablecon sendi al ni ekzempleron de la n-roj 46 kaj 53 de «*Pražské Noviny*», en kiuj estas longaj kaj bonegaj artikoloj pri nia lingvo, ĝia gramatiko, k. t. p. — «Pr. N.» estas ĉiutaga gazeto en la lingvo bohema; ĝi eliras ĉiutage po 30000 ekz.

*

— **S-ro Jan Kajš**, sekretario de U. S. A. E. en Brno, skribis al ni interesan leteron, el kiu ni eltiras la sekvantajon.

Mi sendas al vi adresaron nur de niaj aktivaj membroj, ĉar la aliaj estas membroj kaj Esperantistoj nur laŭ la nomo.

Ekzistas en Aŭstrujo multe pli da Esperantistoj, sed bedaŭrinde ne ĉiuj sentas la devon subteni per kotizajo sian societon. Tial nia societo ne povas efektiviĝi siajn propagandajn planojn, ĉar labori sen mono estas tre malfacile, malgraŭ la kiel eble plej granda energio...

En nia lando, nia situacio estas tre malbona pro «*Volapük*». Estis ja en multaj urboj Moravaj kluboj Volapükistaj, kiuj, kompreneble, baldaŭ malaperis, sed lasis post si multajn antaŭjuĝojn kontraŭ la lingvo internacia.

Ni tre bezonas propran Bohemo-Esperantan gazeton pro multaj kaŭzoj. Kiam eklumos tiu tago?

Tiun ĉi plendon de nia fervora samideano ni jam ofte aŭdis de multaj aliaj: nekalkulebla nombro da Esperantistoj, eĉ tre fervoraj, *ne aliĝas sian lokan Grupon!* Kiam do niaj amikoj komprenos, ke laboradi sola estas dissemi en dezerto!!

El Bulgarujo.

— **S-ro Hr. Popov** skribis al ni: «Nia gazetaro daŭrigas tre favore akcepti Esperanton. La tria kajero de revuo «*Svet*» enhavis la tradukon de l' sekvantaj rakontoj: «*Nerveco*» (tradukita de Ĥr. Ĥaralambev), «*Feliĉo*», versaĵo en prozo (trad. de F. Kanej). — La kvara kajero de l' sama revuo enhavas la rakonton «*En printempo de l' juneco*» tradukitan de

mi. Tiu ĉi rakonto estas daŭrigata dum 2 aŭ 3 kajeroj. Krom tio, la revuo alportis Esperantan tekston titolitan «El Esperantista mondo».

Nia klubo en Filipopolo jam fondis du gazetojn: unu manuskripte («*Rondiranto*») kaj l' alian prese («*Rondiranto*», pri kiu L. I. parolis, 1902, marta numero). Mi povas nun deziri nur unu aferon: ke Esperanto progresu en ĉiu lando, kiel ĉe ni.

*

— **La Lumo**, klubo Esperantista en V.-Tirnovno aranĝis ĉiudimanĉajn kunvenojn por ekzercado pri Esperanta interparolado.

La 17/30-an de majo lasta en V.-Tirnovno S-ro Ĥaralambev faris parolon en tiea intima sinkleriga rondo pri la temo «lingvo internacia kaj Esperanto». Multe da ĉeestantoj petis la parolinton, ke li antaŭlegu ion en Esperanto; li do antaŭlegis unu rakonton kaj unu versaĵon. La impreso kaj rezultato estis bonega.

*

— **Rondiranta manuskripto** jam de kelka tempo ekzistas en Bulgarujo. (Vidu artikolon de S-ro *Bavay*, — L. I. 1902, n-ro 3.) La Bulgara-Esperanta gazeto «*Rondiranto*» sciigas al ni per sia dua n-ro, ke tiu manuskripto tiel grandan sukceson ricevis, ke baldaŭ oni estos devigata dividi la bulgarajn Esperantistojn en kelkajn rondojn, por plirapidigi la iradon de l' manuskripto.

El Hispanujo.

— **Nova gazeto.** Bonega sciigo alvenis al ni el Santander: *Gazeto Esperanto-Hispana* fondiĝis por la propagando de nia lingvo en Hispanujo kaj en latina Ameriko. — La titolo de tiu ĉi nova propagandorgano estas «**Esperanto**», ĝia enhavo estas precipe artikoloj en Hispana lingvo, gramatiko por Hispanoj, tekstoj Esperantaj, k. t. p.

Ni tre ĝojis pro la fondo de tiu ĉi gazeto, ĉar en Hispanujo, malmultegaj ĝis nun estis niaj adeptoj, kaj tre vasta kampo estas tie malfermita antaŭ nia kolego. Ĝi vivadu kaj sukcesu!

El Holando.

— **S-ro Dreves Uitterdijk** sendis al ni «*Nieuwsbode uit de Ansichtskartenwereld*» (n-ro 2, 13-an de marto 1902), holandan revuon por poŝtkartoj, en kiu estas presita artikolo de li pri Esperanto, kaj la lastaj propagandaj novaĵoj. La artikolo finiĝas per sciigo pri estonta kunveno por fondi Societon Esperantistan en Holando.

El Kanado.

— **Publika parolado.** S-roj A. *Saint-Martin* kaj J. B. A. L. *Leymarie* faris en la 18-a de februaro lasta ĉe la klubo *Letellier*, en Montreal, publikan paroladon por Esperanto. — «Pli ol cent personoj ĉeestis, diras la gazeto «*La Lumo*», kiuj unuvoĉe decidis aliĝi Esperanton.» Poste S-ro F. *Larkin* ekparoladis kiel Anglo, kaj certigis ke nia lingvo estas tre ŝatata en Anglujo, kaj ĉe la Anglokanadanoj.

— **Kursoj.** Senpagaj kaj publikaj kursoj pri Esperanto estas farataj de S-ro *Leymarie* ĉe la «*Monument National*», kaj de S-ro *St.-Martin* ĉe la klubo *Bernier*, en Montreal. — Bronza medalo estos donata de la Societo «*Association Philotechnique de Paris*» al tiu el la nomitaj kluboj, kiu estos la unua en estonta konkurso.

— **La gazetistaro.** En Montreal, la gazetoj «*La Presse*», «*La Patrie*», «*Le Journal*», «*Les Débats*», «*Le Monde illustré*», «*Le Pionnier*» favore parolis pri nia lingvo. En aliaj urboj, same faris la gazetoj «*La Défense*» en Chicoutimi, «*l'Opinion publique*» en Worcester (Mass, U. S. A.) kaj «*La Semaine Religieuse*» en Québec.

«*LA LUMO*» (n-ro 3, marto 1902) enhavas amikan notizon al nia gazeto, pri kiu ni tre dankas ĝin.

El Belgujo.

— **La Esperantista Sekcio** de «*Cercle Polyglotte*» en Bruselo ĉiam daŭrigas sian energian propagandon tra Belgujo. Unu el niaj plej eminentaj partianoj, S-ro *Kapitano Lemaire*, kiu aranĝas nun ĉe la Antverpena Ekspozicio sekcion dediĉitan al Esperanto, samtempe presigis en «*Le Petit Bleu*» multajn kaj longajn artikolojn rilatajn de la 2-a kaj de la 9-a de majo al nia afero. S-ro *J. Jamin*, prezidanto de l' Esperantista Sekcio de C. P. ankaŭ skribis artikolojn en diversaj gazetoj. — S-ro *Cogen* bataladas por fondi Belgan Societon de Esperantistoj. S-ro *Blanjean* faras kursojn (kien iras regule 42 lernantoj) ĉe «*l'Extension de l'Ecole Normale*» . . . sed ni haltu, kaj petu niajn ceterajn nenomitajn propagandantojn kaj fervorajn samideanojn, ke ili senkulpigu nin pri nia silento, ĉar baldaŭ L. I. ne sufiĉos plu por raportoj ĉiujn iliajn tiel laŭdindajn farojn.

Samtempe ni estas feliĉaj uzi tiun ĉi okazon por aparte gratuli S-ron *Ch. Lemaire* pri lia ricevo de medalo de la «*Société de Géographie Commerciale de Paris*». Tiun medalon li ricevis pro la lasta esplorado en Afriko, kiun li majstre gvidis.

La esplorantaro komencis sian iradon de la enfluo de Zambezo je la 25-a de majo 1898, kaj atingis l' enfluan de Kongo je la 5-a de septembro 1900, tiel trairinte tutan Afrikon, kaj irinte 6000 kilometrojn tere kaj 600 akve. — La geografikartaj laboroj estis kiel eble plej zorge farataj, kaj ŝanĝis sufiĉe grande la antaŭajn kartojn. La tuta suprolinio interkongo-Zambeza estas translokita en iaj lokoj ĝis 35 kilometroj. Kapitano *Lemaire* montris ke ĝi estas absolute malkonfuza. Li trovis ke lago *Dilolo* estas malgranda senelflua lageto, kiu nur dum la grandaj pluvegoj superbordigas kaj sendas sian troan akvon al «*Lo-Tembuo*» rivero kunflua de Zambezo. Li precize determinis la situacion de lago *Moero*. Li esploris la grotajn de *Ka-tango*, kaj pruvis, ke ili tute ne estas loĝataj de «*Trogloditoj*» *), kontraŭ la opinio de iaj scienculoj. Li ankaŭ solvis la demandon pri la deveno de rivero Kongo.

Al tiuj ĉi geografiaj rezultatoj oni devas aldoni meteorologiajn observojn, geologiajn kaj minajn serĉojn, esplorojn pri bestaro kaj kreskajaro, antropologiajn mezurojn faritajn de S-ro *Ch. Lemaire* aŭ liaj kunlaboristoj. Grandaj kolektaĵoj pri naturhistorio, kun pentraĵoj kaj fotografajoj estis alportataj. La *Katanga* esplorado donis do grandajn kaj utilajn rezultatojn, kaj oni povas nur ĝoji, ke Esperanto estas subtenata de viro, kiel S-ro *Ch. Lemaire*.

El Svedujo.

— **Sveda Turista Ligo.** Nune estas elsendata la jarcirkulero por 1902 de la Sveda Turista Ligo. En ĝi sin trovas, inter adresoj de la reprezentantoj, ankaŭ adresoj de esperantistaj. Devoj de la reprezentantoj estas, kiel dirite, per informoj kaj konsiloj helpi svedajn kaj fremdajn turistojn en Svedujo kaj svedajn en fremdlandoj. — Nur malgranda komenco, sed tamen komenco, estas tiel farita.

Nun, estas aparte dezirinde, ke kiel eble plej multaj svedaj esperantistoj en diversaj lokoj prenu sur sin reprezentantecon por S. T. L. Pri tio oni sin turnu aŭ rekte al «*Svenska Turistföreningen*, en Stockholm (tiam akcentu ke estas en eco de *Esperantist*), aŭ eble pli bone al iu el la nunaj esperantistaj reprezentantoj (mi, S-roj *Süssmuth* — *Södertelge*, *Holm* poŝta eksped. *Upsala*, *G. Roybard* — *Skattungbyn*, *Hugo Karlsten* — *Holmedal*), kiuj zorgos pri raporto al S. T. L. — Membreco kostas 3 kr. jare; la membroj ricevas la grandan, interesan, belilustritan svedlingvan jarlibron senpage.

Oni vidas sen argumentado, ke nia celo estas: venigi aeron sub la plugilojn de Esperanto.

G. Palm, Varmlösa, Rydsgård.

El Francujo.

— **Publikajn paroladojn** pri Esperanto faris: S-roj *E. Goujon* en *Nice*, *Louvet* en *Lille*, D-ro

*) «*Trogloditoj*» estas la nomo de antikva Afrika gento, kiu vivis en kavernoj (τρογλιθη = kaverno, δεειν = eniri).

Sprecher en *Clamecy*. — En Lyon S-ro Boirac, rektoro de l' Akademio Grenoble, faris grandan paroladon sub la prezido de S-ro Compayre, rektoro de l' Akademio Lyona, kun akompano de lumfigurajoj; ĉirkaŭ milo da personoj ĉeestis. La sekvintan tagon, estis malfermita kurso pri Esperanto por la membroj de l' «Touring-Club», 450 personoj ĝin sekvas. La kurso estas farata de S-ro Deronsière, profesoro de angla lingvo ĉe la lernejo komerca. Fine, Grupo Esperantista tuj fondiĝis, kies ĝenerala sekretario estas S-ro Offret, profesoro de mineralogio, dank' al kiu estas farita tiu ĉi movado.

— En Reims, S-ro Josefo Rhodes, nia fervora angla amiko, kaj S-ro Démarest, komitatano de S. p. E. renkontiĝis, kaj povis paroli en Esperanto dum kelkaj tagoj. — S-ro Jos. Rhodes, apenaŭ reveninte Skotlandon, prezentis Esperanton al la komerca ĉambro en Keighley; li klarigis la problemon pri internacia lingvo, nian lingvon, ĝian nunan staton, montris kolekton da 120 poŝtkartoj el ĉiuj partoj de la mondo, kaj diris ke li mem povis tre facile paroli per Esperanto en Reims. — La komerca ĉambro decidis aliĝi la Delegacion de S-ro Leau, kaj elektis S-ron Rhodes kiel delegiton. S-ro Rhodes havis l' afablecon sendi al ni la gazeton «Keighley News» kiu raportis detale pri tio.

— En Paris. La Grupo Esperantista Pariza havis eksterordinaran ĝeneralan kunvenon, pri kiu ni petas niajn legantojn, ke ili vidu la rubrikon «*El la Societoj Esperantistaj*». S-ro Bourlet, prezidanto de l' Grupo kaj delegito de l' «Touring-Club» donis al S-ro Cart, je la nomo de la T.-C. medalon el orita arĝento, kiel memoraĵon pri la kurso farita de li al la membroj de l' T.-C., en la Liceo Condorcet.

— S-ro Bourlet faris paroladon por Esperanto ĉe la «Société de Géographie Commerciale» (12. IV.) kaj alian ĉe la «Société des anciens élèves des Ecoles nationales d'Arts et Métiers» (15. IV.)

— S-ro Cart, agregato de l' Universitato, profesoro ĉe la Liceo Henri IV, kaj Lernejo de la Politikaj Sciencoj, ĝenerala kasisto de l' Lingvistika Societo, elverkis novan, tute rekomendindan propagandobroŝuron pri nia lingvo.

S-ro Cart faris paroladon ĉe la «Société de conférences populaires».

— La gazetistaro. Favore parolis pri Esperanto en la lasta tempo la sekvantaj gazetoj: Salut public de Lyon, Tout Lyon, Lyon Républicain, Nouvelliste de Lyon (Ch. Méray), Progrès de Lyon, Reveil républicain de Lyon, Revue Bourguignonne, Archives des Collectionneurs (H. Douchet), Jeune fille française, Journal d'Alsace — Strasbourg, Radical, Le Signal (L. Démarest), Echo de Clamecy, Alpes de Gap, La Paix par le Droit, Le Bien Public de Dijon, Le Réveil du Dauphiné, Le Petit Dauphinois, Le Globe Trotter, Le Cri du Quartier (H. Ramier), L'Européen (P. Fruictier), L'Indépendant Franc-Comtois (St.-Loup), Indépendance Luxembourgeoise (F.

de Courmelles), Revue Universelle (C. Bourlet), Messager de Paris, Le Figaro, La Dépêche Coloniale, Le Radical, Le Petit Parisien, Le Vélo, L'Indépendant de Perpignan, L'Éducateur (H. Blanc), L'Intermédiaire des Institutrices (Mlle Hugonet), La Plume Sténographique, Le Petit Journal, k. t. p.

En la marta n-ro de *L'Espérantiste* estas anonco pri la ŝanĝo redakcia en L. I. La nomita gazeto varmege rekomendas al siaj legantoj aboni nian organon.

Le Bien Public, Le Petit Bleu de Bruxelles, L'Indépendant Franc-Comtois, aparte parolis pri nia gazeto kaj nia «Avizo» al komercistoj.

Koran dankon al la aŭtoroj!

— Kursoj. En Paris S-ino Lombard organizis ĉe si kurson de Esperanto por la membroj de I. C. — S-ro Chavet komencis ĉe la lernejo profesia de la Stenografi-Kalkulistoj kurson sekvatan de kvardeko da lernantoj. — S-ro Wintzweiler, profesoro agregita de l' Universitato, komencis kurson ĉe «l' Association philomathique»; li havas ĉirkaŭ 55 aŭskultantojn. — S-ro Th. Cart komencis novan kurson «supergradan» ĉe la Liceo Condorcet. — S-ro Clarac finis sian kurson ĉe la Liceo Charlemagne. — S-ro Fruictier ankaŭ finis sian kurson ĉe l' Instituto popola por komerca instruado.

En Dijon S-ro Lallement kaj Beau faras kurson por la tieaj membroj de «Touring-Club»; — ĉirkaŭ 100 lernantoj sekvadas ĝin.

En Besançon S-ro Vandaele, profesoro ĉe la literatura fakultato komencis kurson en la 9-a de marto, kun la helpo de «Touring-Club».

En Lyon ĉirkaŭ 300 personoj daŭrigis sekvadi la kurson de S-ro Croisier (kurso de Tour.-Club).

Ĉe la Rema Esperantista Grupo S-ro Démarest faras kurson sekvatan de granda nombro da grupanoj.

En la Lernejo supera de Fournes S-ro Louvet komencis tre sukcesodonan kurson.

— Bibliografio. La Vortaro Esperanto-Franca de S-ro L. de Beaufront jam devis reeldoniĝi, ĉar la unua eldono estis elvendita dum la unua monato. (1500 ekz.)

Nova lernolibro por Francoj eliris el la presejo de firmo Hachette sub la titolo «*Esperanto en dek lecionoj*» — Kurso de Touring-Club de France. La aŭtoroj estas S-ro Cart, profesoro de la germana lingvo en la Liceo Henri IV, kaj S-ro Pagnier. Tiu ĉi lernolibro estas pleje praktika por rapide el-lerni Esperanton. — Ĝi enhavas gradigitajn Ekzercojn Esperanto-francajn kaj franco-Esperantajn, vortaretojn, poeziojn k. t. p. kaj gramatikon tute en Esperanto. Tiu libro estas jam de kelka tempo la sola uzata en preskaŭ ĉiuj kursoj en Francujo, kaj nur gratulegojn oni povas alsendi al la aŭtoroj por la klareco, la simpleco kaj la scienco, kiujn ili metis en tiun ĉi verkon.

Propagandan broŝuron ankaŭ skribis S-ro Cart, tre sprite kaj en agrabla stilo verkitan.

Sciencan broŝuron eldonis la Grupo Esperantista en Dijono, pri la matematika teorio de l' tiea sunhorlogo. La teorio estas skribita france kaj Esperante de S-ro Gruet, direktoro de observatorio en Besançon; ĝi estas eltiraĵo el «La Revue Bourguignonne de l'Enseignement supérieur». Al tiu ĉi artikolo estas aldonitaj kelkaj paĝoj de S-ro P. A. Dombrovski koncerne la V-an Eŭklidan Postulaton.

Tiu verko, unu el niaj unuaj sciencaj verkoj, estis sendita al multaj matematikistoj kiuj tre surprizigis pri la klareco kaj taŭgeco de Esperanto por matematiko.

El Broŝuro de S-ro Bollack (aŭtoro de sistemo de lingvo internacia) titolita «Vers la langue internationale» ni eliras la jenan konfesion de l' supereco de Esperanto:

«Esperanto estas en la nuna tempo la sistemo kiu havas plej multajn adeptojn. Tiu ĉi mirinda interkomunikigilo havas la grandan econ esti belsona kaj tre facile ellernebla.»

Ĉu tia konfeso de konkuranto ne estas kara pruvo favora al nia lingvo?

Propagandajn foliojn eldonis la grupoj Esperantistaj en Dijon, Besançon kaj Lyon.

En la Besançona folio estas nia «Aviso» al komercistoj. — Ni sincere dankas S-ron Saint-Loup, prezidanton de l' Grupo.

Vortareto Franco-Esperanta estas eldonita de l' Grupo Esperantista Pariza. La vortareto estas verkita de S-roj Th. Cart, Boitel, Cartault kaj Verax.

Tiu ĉi verko, kiu tute mankis al Francoj, estos baldaŭ presigita de la firmo Hachette.

— **Nova Grupo Esperantista** estas fondita en Reims de S-ro Démarest, laŭ la nova regularo de l' Grupo Pariza. Ĝi kalkulas jam pli ol cent membrojn kvankam ne ankoraŭ plene organizita.

S-ro Démarest eldonis poŝtkarton propagandan kun reklamo por Esperanto en ses lingvoj. Tiuj ĉi poŝtkartoj kostas aŭ frankite: 50 k. po 1 f 25, 100 k. po 2 f, 100 k. po 15 f-j.

La adreso de S-ro Démarest estas: Reims (Marne), 50, Rue de l' Université.

— **Diversaj sciigoj.** I. C. C. P. gazeto por filatelistoj kaj kolektoj de ilustritaj poŝtkartoj, komencas eldonon de vortareto por filatelistoj Esperantistaj kaj anoncas ke ĝi enpresos l' adreson de ĉiu Esperantisto kiu kolektas poŝtmarkojn aŭ poŝtkartojn. Oni volu peti pri pli detalaj sciigoj kaj pri la kondiĉoj. Oni sin turnu al I. C. C. P., 4, Rue Royer Collard, Paris.

— **FERVORA ESPERANTISTO,** membro de la komitato de l' Grupo Esp. Pariza, S-ro Tarbouriech, profesoro ĉe l' «Ecole libre des Sciences sociales» entreprenas grandan vojaĝon tra Rusujo Eŭropa kaj Azia. Li intencas ekvojaĝi inter la 15-a de julio kaj 1-a de aŭgusto, iros Varsovion, S.-Peterburgon, Vladivostokon. Poste li intencas vojaĝi

en Japanujo dum la «Festo de l' Floroj» (septembro), iros en Hanoin dum la tiea ekspozicio (novembro) kaj revenos Eŭropon tra Hindujo. Senutile estus diri ke li intencas viziti kiel eble plej multajn Esperantistojn dum sia vojaĝo. Oni volu plej baldaŭ skribi al li por interkonsenti la renkontigojn.

Oni sin turnu al S-ro Tarbouriech, 19, Rue du Sommerard, Paris, aŭ al la redaktoro de la gazeto L. I. kun la surskribo: Por S-ro Tarbouriech.

El la Societoj kaj Grupoj Esperantistaj.

Grupo Esperantista Pariza. La prezidanto de G. E. P. havas la honoron sciigi la membrojn de l' Grupo, ke, ĉe la eksterordinara ĝenerala kunveno, en la 22-a de marto 1902, oni unuvoĉe decidis ŝanĝi la societatan regularon, laŭ la propono de l' Komitato jam dissendita al ĉiuj Grupanoj. Sekve, de nun estos du kategorioj de membroj; unu, kies membroj pagas l' antaŭan kotizajon, estos membroj de S. p. p. E. kaj ricevos «l' Espérantiste»; alia, kies membroj (kunsocietanoj) pagos nur po 2 f-j ĉiujare, ne estos membroj de S. p. E. kaj ne ricevos «l' Espérantiste». — La diversaj kategorioj de membroj estas do resume la sekvantaj:

Membroj honoraj.

Membroj aprobantaj } Membroj de S. p. p. E.
» adeptaj }

Kunsocietanoj aprobantaj } Ne membroj de S. p. p. E.
» adeptaj }

La prezidanto: CARLO BOURLET.

DIVERSAĴOJ.

I. Mi ricevis de diversaj flankoj kelkajn artikolojn kaj tekstojn rilatajn al malnova disputado kiu stariĝis inter legantoj de L. I. antaŭ unu aŭ du jaroj!! Laŭ la kutimo, la disputantoj, eluzinte la saĝajn argumentojn, tute forgesis la temon de illa disputado, kaj deziras nun sin ataki reciproke kaj nome. Kompreneble mi ne povas akcepti tiajn aferojn. L. I. ne estas persona polemikejo; kaj, cetere, la kontraŭuloj jam paroladis, reparoladis, respondis kaj rerespondis unu la alian! Multaj el la legantoj jam plendis pri tiuj ĉi neutilaĵoj, kaj eĉ malutilaĵoj, kiuj plenumis almenaŭ 18—20 paĝojn de L. I. Mi tre certe esprimos la opinion de l' plimulto el niaj abonantoj, sciigante ke *ni ne presos iajn ajn personajn polemikaĵojn.* Estus do senutila peno sendi al ni tiajn tekstojn. *Tiu ĉi nia decido,* de S-ro de Lengyel kaj de mi mem, estas neŝanĝebla.

II. Mi petas la tradukintojn sciigi pri la nomo de l' aŭtoro tradukita, kaj la deveno de l' verko. Samtempe, mi tre volonte denove malfermos l' antaŭan rubrikon: «Tradukataĵoj» por ke niaj legantoj ne ricevu enuon, tradukante jam tradukitajn verkojn. S-roj aŭtoroj nun respondu.

PAUL FRUICHTIER.



† S-ino G. Bolsius havas la doloron sciigi la Esperantistojn pri la morto de sia filo **Eduardo Bolsius**.
Antverpeno, Belgujo.

Alvoko al Esperantistaro. Entrepreninte dank' al la konsilo kaj helpo de S-ro N. P. Evstifejev internacian vojaĝon el Siberio tra Eŭropon, mi petas ĉiulandajn Esperantistojn ke ili volu skribi al mi, en kiujn lokojn Esperantistajn estus bone kaj oportune veturi. Leterojn de nun oni volu sendi al: «Autriche-Moravie, Brno, al Unua Societo de l' Aŭstraj Esperantistoj, Jusova ul. 8. (por S-ro I. Seleznoj).»

Internacian kaj koran dankon al ĉiuj miaj korespondantoj!

IVAN SELEZNOJ.

= La hodiaŭa numero de nia gazeto portas la numerojn 4—5 kaj ĝi ampleksas 20 paĝojn. Ni aranĝis tiamaniere, ĉar pro la traktado inter la redaktoro kaj administranto en januaro kaj februaro ni perdis tempon, kiu perdo kaŭzis malfruon de nia gazeto. Por ke ni atingu la regulan eliran tempon, ni nomas tiun ĉi kaj la venontan numeron duoblaj; la diferencon pri la amplekso, kiu montriĝas kaŭze de tiu ĉi arango,

Ĉiuj ajn Esperantaj verkoj estas aĉeteblaj ĉe

..... **A. Cratier & J. Rey.**

Eldonistoj. — Librovendistoj.

23, Grande-Rue 23

Grenoble (France).

Ricevas abonojn por «L. I.» kaj «Rondiranto».

«Lingvo Internacia», «Rondiranto», ĉiuj aliaj verkoj sin trovas ĉe

Henri Georg.

Librejo de l' Fakultatoj.

36—42 Passage de l' Hôtel-Dieu 36—42
Lyon (France).

Abonoj al gazetoj. Ĉiuekzemplera vendado. Lernolibroj k. t. p.

ni anstataŭos tiamaniere, ke ĝis la fino de tiu ĉi jaro ni elirigos ĉiun numeron en amplekso de 20 paĝoj.
LA RED. KAJ ADM.

PROBLEMOJ.

IX.

— De **A. C. Continho.** —

Mi havas 6 literojn, kaj estas parto de granda besto; forprenu la unuan literon, kaj mi estas besto trovata en la maroj; forprenu ankoraŭ du literojn, kaj mi farigas abverbo.

X.

— De **pdl.** —

Kie komenciĝas kaj kie finiĝas la vivo de l' rano?

= La solvojn de tiuj ĉi problemoj ni presos en la n-ro 8, kune kun la nomoj de l' divenintoj. La solvojn oni sendu al la administranto.

Solvoj de la problemoj trovataj en la n-ro 2: III. Ne klopodu superi la nesupereblan. IV. Saluton al doktoro Zamenhof. V. Edison. — Solvis ĉiujn problemojn: S-rino Caroline Wieslander; ne ĉiujn: O. kaj K. Bezin, D. Piskunov, N. Studenov.

I. C. C. P.

Monata Revuo por la kolektistoj de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Oni ricevas korespondojn sur ĉiuj aferoj rilatantaj al markoj kaj kartoj.

La eldonantoj de poŝtkartoj estas petataj sendi ekzemplerojn de iliaj novaj kartoj kun la komercaj prezoj. Oni deziras ricevi fremdajn gazetojn pri poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Abonprezo: 3 F-koj ĉiujare.

==== Adreso: ====

ICCP. 4, Str. Royer-Collard, Paris. France.

Oni korespondas en Esperanto.

Oni abonas L. I.

ĉe

L' administranto de la gazeto S-ro PAUL de LENGYEL en Szegárd (Hungarujo).	La redaktoro de la gazeto S-ro PAUL FRUICHTER 27 Boulevard Arago 27 en Paris (Francujo).	D-ro L. ZAMENHOF ul. Dzika N° 9 en Varsovio (= Warszawa) (Rusujo).	S-ro P. AHLBERG Sekretario de Klubo Esp. Döbelnsgatan 50. en Stockholm (Svedujo).
---	--	--	---

Kosto de abono por jaro: 5.75 frankoj = 5.50 hungaraj kronoj = 4 skand. kronoj = 4.50 germanaj markoj = 2 rubloj. Unu numero kostas 50 centimojn. Abonoj estas akceptataj de l' komenciĝo de ĉiu monato. Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por 1/2 de ilia valoro.

Pago por anoncoj: 30 centimoj = 30 heleroj = 22 oeroj = 24 pfenigoj = 12 kopekoj por duonpaĝa petiltinio; ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. — Pagi por anoncoj oni povas ĉe la kvar suprenomitaj sinjoroj, sed la tekston oni sendu nur al la administranto aŭ al la redaktoro.

AVIZO GRAVA. Manuskriptojn oni sendu nur al la redaktoro, kies nomon oni devas ĉiam skribi. Nepresitajn manuskriptojn ni ne resendadas.